Annette von Droste-Hülshoff,

# Je l' novjartago

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Peziĝas la okuloj je vespero;
Adiaŭ, jar' kun ĝojo kaj sufero!
Donacos novan jaron la ĉiel'.
La hom' sin klinas antaŭ la Sinjoro,
Malnova falas, ĝermas nova floro
El la glacio kun Dieca bel'.

La nokto fuĝas, fuĝas dormo same;
Bonvenon, tag', mi vin salutas ame!
Jen vi ja estas, kara nova jar'!
Majeste jen ĝi estas ja staranta,
La tutan teron brile ĉirkaŭanta,
Kun seriozo kaj matena klar'.

Mi portas novan provon de l' Sinjoro
Al vi kuraĝa, forta homa koro,
kaduka tamen, mi salutas vin!
Mi vin salutas, kara jaro, ĝoje,
Se suferigos vi min ankaŭ foje,
Volonte kun la viv' mi prenos ĝin.

*Traduko de la Germana poemo "Am Neujahrstag" de* Annette von Droste-Hülshoff *(∗1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-157-310 (2004-03-30 15:52:11)*